

## Literaturo

- 1) Saeki, A.: Bull. Jap. Soc. Sci. Fish. 23, 11, 684 — 695, (1958).
- 2) Kawai, A., Yoshida, Y. kaj Kimata, M.: Bull. Jap. Soc. Sci. Fish. 30, 1, 55 — 62, (1964).
- 3) Chiba, K. kaj Oshima, Y.: Bull. Jap. Soc. Sci. Fish. 23, 7 — 8,348 — 353, (1957).
- 4) Shelbourne, J. E., Riley, J. K. kaj Thacker, G. T.: J. du Conseil, 28, 1, 50 — 69, (1963)
- 5) Migita, S.: Bull. Fac. Fish. Nagasaki Univ. 8, 209 — 215, (1959).
- 6) Kuwatani, Y.: Bull. Jap. Soc. Sci. Fish. 30, 2, 104 — 113, (1964).
- 7) Kuwatani, Y.: Bull. Natl. Peare Res. Lab. 9, 1135 — 1142, (1964).
- 8) Yosida, M.: Yosyoku 2, 5, 46 — 47, (1965).
- 9) Nomra, T.: Scienca Revuo 15, 1—2, 53 — 58, (1965).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

151.91:177 + 394

## LA MALĜUSTA KALKULO

(d-ro W. Ehrenberg, München, Germanio)

»Bona kalkulanto« oni hodiaŭ nomas homon, kiu gvidigas sin senescepte per profitkonsideroj. Tio signifas, ke li inter diversaj eblecoj elektas ĉiam tiun, kiu alportas al li la plejmulton, kiu estas plej profitdona. »Memkompreneble« li egaligas tiun gajnon kun mono kaj ĉio aĉetebla. Tio, kio malpliigas la propran aĉetvaloron, tute ne estas konsiderata, ĉar forpreni el la medio kiel eble plej multajn valorojn por kiel eble plej malmulta ekvivalento, tion li konsideras kiel leĝon dela »prudenteco«. Se tia homo krom aĉeteblaj aĵoj agnoskas ankaŭ fizikan forton, li sentas sin kiel »realisto« kaj nomas »nerealisto« ĉiun, kiu krome agnoskas aliajn valorojn kaj fortojn.

Sed kia estas fakte la situacio? Kion ni homoj funde serĉas ĉasante monon kaj aĉeteblajn valorojn, estas ĝojo; ĉiuj motivoj je mongajno devenas el la deziro, eviti dolorojn kaj gajni ĝojon, Tiama-niere ni ĉiuj bezonas iun minimumon da mono, por ke ni mem kaj niaj familianoj ne malsatu aŭ frosta, por ke nia movlibereco ne estu malhelpata kaj ni ricevu helpon se necese; do helpilon kontraŭ korpaj aŭ animaj doloroj. La kontentigo de tiaj bezonoj ne finas nian dezi-regon je mono: Ni volas esti kapablaj manĝi, loĝi kaj vesti sin pli altnivele ol necese, aĉeti diversajn aĵojn, ĉeesti aranĝaĵojn, vojaĝi, koncize dirite, permesi al ni tion, kio ĝojigas nin. Ankaŭ tiu, kiu amasigas monon pro mono, faras tion por ĝojigi sin. Forigo de doloro kaj gajno de ĝojo do estas la komuna denominatoro.



Tiu ekono gvidas nin al nova valoraskalo: valoron havas tio, kio ĝojigas. Do ĉio devas esti reduktata je ĝojo, se ni volas ekkoni ĝian veran valoron. Per tio la kutima materia valoraskalo estas ekkonata kiel nerealista kaj anstataŭata per psika laŭ-realeca valoraskalo. Nun laŭkone ekzistas pli multe da aĵoj, kiuj faras ĝojon, ne nur la aĉetebloj. Precipe ĉiu ĝojas pro la ludo de siaj propraj fortoj, grandaj aŭ malgrandaj, se li ne mem detruas tiun ĝojon per malĝusta sinteno. Ni pensu al la ĝojo, kiun faras al ni la donacado kaj la gastigado ĉe societoj, se ni estas ankoraŭ ne troklerigitaj. Aŭ kiu ne ĝojus pri okazo helpi alian en akuta danĝero aŭ kiu ne volonte montrus la vojon al fremdulo?

Pro tio ne estas vere, ke ni devu registri ĉiun plenumitan faron kiel minuson tio estas kiel malgajnon, se ĝi ne estas kompensata per ekvivalento, kiel nia monekonomio volas kredi al ni. Se nia faro ĝojigas nin, tio estas ĉiukaze gajno por ni, egale ĉu ni ricevas ion por tio aŭ ne.

Per tio ni venas al alia malkonformeco inter monvaloro kaj vivvaloro. Kontraŭe al la monvaloro la vivvalorone malgrandiĝas, se oni donacas ĝin. Jam la germana fizikisto kaj filozofo Oswald ekkonis tiun malkonformecon, kiam li konstatis, ke ĉe ĉiu negocado ekestas valorplimultigo. La vendisto ne fordonus sian komercaĵon, se li ne preferus la monon kaj la aĉetemulo ne aĉetus ĝin, se ĝin ne estus pli valora por li ol lia mono. Do la ĝojsumo ne sekvas la konservajn leĝojn kiel malfontlokoj de la ĝojo. Tiujn kanalojn de konektado kun neelĉerpebla transcenda ĝojujego ni havas en ni mem. La kvalito de nia ecaro decidas, ĉu laŭsituacie okazas enfluo aŭ forfluo de ĝojo.

Ĝojo tute ne estas fordonebla kiel varo, sed nur vekebla. Bona kiel malbona humoro estas infekta, tion ĉiu povas observi. Kaj per tio, ke mi transigas mian humoron al alia, la mia ne malpliĝas, nek en bona nek en malbona senco, sed eĉ estiĝas reciproka plifortigado en la eka humordirekto.

Se ĝojo do ne estas io, kion mi povus aŭ devus forpreni de aliaj homoj, por gajni ĝin al mi mem, sed se ĝi povas fondi nur el mi, estas por mi gravege ekscii, kion mi povas fari por fluigi tiun kurenton pli ofte kaj pli forte. Al tio ja fakte celas nia tuta agemo, se ĝi ne estas nur negative direktata al tio protekti nin kontraŭ perdiĝo de tiu fonto. Bedaŭrinde plej multaj homoj serĉas en malĝusta direkto, nome en la ekstera mondo. Antaŭ kiam tiu ĉi povas servi nin, fluigadi nian ĝojofonton, ni precipe devas fariĝi impreseblaj

por la medio. Tiom longe kiom ni ne scipovas utiligi ĝin tia kia ĝi nun estas, ekzistas malmulte da ŝanco, ke eksteraj ŝanĝoj multe helpus nin. Krom tio ke ĉirkaŭaĵa ŝanĝo ne estas ĉiam ebla, mi refoje povis observi, ke malkontentemaj karakteroj, kiuj sukcesis ŝanĝi siajn vivkondiĉojn, en la tiom pasie dezirata nova situacio baldaŭ sentis sin same malbonfartaj kiel en la malnova. Aliaj, al kiuj la cirkonstancoj permesis plenumi ĉiujn siajn dezirojn, perdis pro tio pli kaj pli sian ĝuokapablecon kaj bezonis de jaro al jaro pli fortajn stimulojn por elpremege ankoraŭ kelkajn gutojn el la perdiĝanta fonto de sia interno.

Do ni devas ĉiel klopodi je ni mem, plialtigi nian ĝojnivelon. Tute ne estas necesa certa faro, sed komence nur korektado de nia interna sinteno. La maniero, kiel ni reagis al niaj vivcirkonstancoj, estas produkto de antaŭaj prijuĝoj, deziroj kaj timoj. Ni ne povas maligi ekde unu tago ĝis la venonta tiun enhavon de nia psiko kaj per tio nian idearon, sed ni povas ŝanĝi ĝin iom post iom, alproprigante al ĝi ĉiam novajn elementojn. Ĉiu nova ekkompreno signifas ĝermon de tia interna ŝanĝiĝo. Ni tiam ne plu estas la samaj kiel antaŭe. Kaj eĉ se ni dekfoje refalus, ni tamen ĉiam denove retrovus novan lumon, kiu montriĝas al ni. Ĉiufoje kiam ni rememoras nian novgajnititan ekkonon, ĝi plifortiĝas ĝis kiam ĝi fine trapenetras nian tutan vivsentemon.

Do gravas, per kompreno liberigi sin de ĝojomalhelpantaj miskonceptoj. Unu el la plej malbonaj ĝojomalhelpaĵoj estas la principo de la kompenso. Se mi konsideras mian laboron nur kiel kompensan servon por la atendata salajro, mi ŝtopas por mi la ĝojofonton, kiu mia laboro tute nedepende de sia monkompensaĵo povus esti por mi. Se mi konsideras la ricevitan salajron nur kiel la ŝulditan ekvivalenton por mia penado, tio estas speco de kompensa dolormono, mi malhavigas al mi la ĝojon pri tiu vivhelpo. Ĉio, kio fariĝas por ni memkomprenebla, ĉesas esti por ni ĝojofonto kaj la principo de la kompenso vualas ĉion, kion ni ricevas kaj posedas, en la grizan nebulon de la memkomprenebleco. Tie, kie io estas por mi memkomprenebla, estas mia nulpunkto. Ju pli alte mi fiksas ĝin, des malpli ofte okazas supren-deflankiĝoj kaj des pli ofte malsupren-deflankiĝoj. Se mi nun eĉ fiksas la nulpunkton de miaj pretendoj alte super tio, kio estas atingebla por mi, mi vivas en ĉiama malkontenteco sub la samaj vivcirkonstancoj, sub kiuj nepretendulo havas plenan da ĝojo. Ni do interne ne rajtas postuli ion nek kredi ion memkomprenebla, se ni volas maksimumi nian ĝojonivelon sub ekzistantaj eksteraj cirkonstancoj.



Tiu interna sinteno kaj la konsekvenca plialtiĝo de nia ĝojo-nivelo spontane gvidas nin al nova ekstera konduto. Kun nia ĝojo kreskas ankaŭ niaj fortoj. Laborojn, kiujn ni antaŭe faris nur spiregante, ni plenumas nun ludante. Malhelpaĵoj, kiuj antaŭe malekvilibris nin, nun nur kaŭzas nian gajecon. Ĉar kun niaj pretendoj ankaŭ niaj bezonoj malpliigas, ne estas plu malfacile por ni kontentigi ilin. Tiel ni gajnas tempon kaj ideojn pri aliaj aĵoj. Per tio nia estaĵo plivastiĝas trans la limojn de nia korpo. La observo, ke ĝojigo pliigas la propran ĝojon, montras al ni, ke ni estas mistere interligitaj kun la homoj de nia ĉirkaŭaro. Pli kaj pli ni eksentas nin kiel membroj de la tuto kaj ekkondutas nin konvene.

Tiu nivela plialtiĝo de nia konduto iom post iom transformas ankaŭ nian ĉirkaŭaron. Kiel resonance ni nun vekas en la samaj homoj pozitivajn emociojn, kiujn ni antaŭe ekkonis nur de la negativa flanko. Aliaj, kiuj antaŭe estis por ni neatingeblaj, serĉas nun nian rondon kaj novaj viveblecoj prezentas sin, kiuj superas niajn plej idealajn revojn.

(Aŭtora traduko el »Psychophysikalische Zeitschrift« — PZ, jarserio 5, n-ro 2).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

4.091 (048.1)

### ESEO PRI INTERLINGVISTIKA BIBLIOGRAFIO

(A. Lienhardt, Francio)\*

La aktualecaj artikoloj »Interlingvistiko — scienco aŭ iluzio?« de M. W. PIETRZAK (Varsovio) kaj »Freŝa vento en lingvoscienco« de R. SIKORSKI (Omsk), aperintaj en SCIENCA REVUO EN ESPERANTO n°65 (majo 1966) donas enrigardon en relative novan sciencon, kies celo estas studi la teoriajn kaj praktikajn aspektojn de ĉio kio rilatas al interlingvoj.

#### Kio estas interlingvo?

La termino »interlingvo«, nuntempe ankoraŭ ne larĝe konata kaj uzata, elvokas postulon pri klarigo.

Laŭ la difino de M. W. PIETRZAK, interlingvo estas »(unu) lingvo internacia, kiu estas uzata kaj instruata apud lingvo nacia.«

Serĉante nacilingvajn ekvivalentojn de tiu termino, oni trovas francan (F) kaj anglan (A) kun la jenaj difinoj:

— *interlangue* (F) = langue conventionnelle s'insérant entre les langues existantes et suppléant à celles-ci dans les relations internationales (=Konvencia lingvo lokiĝanta inter la ekzistantaj lingvoj kaj anstataŭiganta ilin en la internaciaj interrilatoj). Tiu difino troviĝas en la libro »Précis d'interlinguistique«, pri kiu ni reparolos poste;

— *interlanguage* (A = a language for world intercourse (=lingvo por tutmondaj interrilatoj). Tiu difino troviĝas en la 2a eldono de la konata angla enciklopedio »Webster's Unabridged English Dictionary«. La sama termino estas trovebla en diversaj publikaĵoj precipe usonaj, ekzemple en la libro »Esperanto, the world-interlan-

\* ) 24 avenue de Riedisheim, F-68 MULHOUSE